

Nia feria migrado en Alpoj, 6-a parto
Radioprelego de Claude kaj Andrée GACOND, SRI 626, 1975.10.08 & 11

Cl.- Parolas gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond.

Ni plilongigis ĝis hodiaŭ la someran feriperiodon prezentante raporton pri la migrado okazinta en Berna Oberlando laŭ la iniciato de Svisa Esperanto-Junularo. Vi hodiaŭ aŭdas la lastan prelegon pri tiu ĉi temo.

A.- La plej bela ekskurstago, laŭ ĉies konsento, estis la vendreda. Ĝia celo estis la pasejo Sefinen, 2600 metrojn super la marnivelo. Kiam oni scias, ke ni foriris el la vilaĝo *Stechelberg* situanta je alteco de 900 metroj, oni povas imagi la alsupradon, kiu nin atendis. Sin prezentis du vojeblecoj : ĉu sekvi la fundon de profunda valo, ĉu profiti la ekziston de la fama telero de la monto *Schilthorn* por mekanike alsupri la valan rokvaŝadon kaj poste sekvi padon je montflanko. Ni elektis tiun duan eblecon kaj ni ne bedaŭris, ĉar la ekskurso malgraŭ tiu ĉi artefarita mallongigo restis pli ol okhora kaj ĉefe, ĉar la panoramo, kiu iom post iom disvolviĝis antaŭ niaj okuloj, havis sovaĝan majeston.

Cl.- Forlasi la valon *Lauterbrunnen* per la telero al *Schilthorn* estas io impresiga. En kelkaj minutoj du sinsekvaj kabinoj veturigas nin de 900 al 1600 metroj de alteco. Sub ni la kamparana vivo disvolviĝas. Montanoj falĉis aŭ rikoltis fojnon sur krutegaj kampetoj. Brutoj paŝtiĝis sur aliaj ankoraŭ pli deklivaj gresejoj. Lignaj dometoj grupiĝis sur la pli ebenaj terenoj. En la fundo la malantaŭaj suproj rapidege kreskis.

A.- Ni adiaŭis la telferon en la stacio *Mürren*, kaj tuj ni sekvis la vojon al *Sefinenfurge*. Ĝi krutege alsupris en florplenaj herbejoj. La botaniŝatantoj havis diskutemoj.

Cl.- Ni tagmanĝis sur roka supreto apud alpaĵ dometoj je alteco de 2000 metroj. Komike, ni sidadis formante grandan cirkon, la dorsojn al la aliaj. Tiel ĉiu povis kontempli la pejzaĝon piknikante.

A.- Subite nigra nubego lasis fali sur nin grandegajn pluvgutojn kaj hajlokuglojn. Rapidege ni devis ensakigi la reston de nia provianto kaj surmeti, por la unua fojo en la migrado, kontraŭpluvan mantelon. Ni tuj rekomencis marŝadi supren.

Cl.- La valo, kiun ni malkovris, estis pli kaj pli sovaĝa. La plantojn iom post iom anstataŭis ŝtonoj. Du lagetoj montriĝis. Ŝtonpintoj, kiujn la alpinistoj nomas ĝendarmoj, siluetiĝis kontraŭ la kreskantaj glaĉeroj de *Tschingelgrat*.

A.- La pluvo ĉesis, la ĉielo rebeliĝis duone. Tiu vetervariado certe grandigis la alpecan karakteron de tiu ŝtonoza valeteto. « *Ĉamon !* » ekkriis subite marŝanto. Fakte pluraj havis la okazon vidi raraĵon : Ĉamon, kiu dancas. Ĝi plurfoje saltegis ŝanĝante sian direkton, kurante sur dekliva nevajo, antaŭ ol malaperi. La postvenantoj, kiuj haltis por foti, bedaŭris alveni tro malfrue por tiu spektaklo.

Cl.- Kelkaj timis je la trapaso de la paseja nevajo, tiom ĝi krute deklivis kaj glitis. Ili bezonis helpon.

A.- Je la supro ni sidis momenton sur rokego admirante la ĵus venkitan muregon, kies kreneloj nigre staradis en malhela ĉielo. Vigla vento blovadi. Tri monedoj flugis al ni. Ili almozis

parton de niaj manĝaĵoj, sed ĉar ni ĵetis al ili nur frukterojn, ili foriris por nin rigardi el roka altaĵo. Subite tondris. Estis la momento alvali.

Cl.- Ni rapide enprofundiĝis en la valon de Griesalp vidante ĉamojn, kaj kiam ni reatingis civilizitajn lokojn, ŝafarojn kaj kaprinojn. Tiuj lastaj sin protektis kontraŭ la reveninta pluvo sub la tegmento de alpa rifuĝejo.

A.- En Griesalp ni trovis malnovan naturamikan gastejon, kies gardisto eble ankoraŭ pli oldis. Ni devis iri vespermanĝi en alian gastejon, kaj ni revenis dum la nokto. Ne ĉiam estis facile trovi la padon, kiu serpentumis sur herbejoj, en arbaro kaj eĉ trans torento.

Cl.- Post tranoktado en malpura dormejo kaj matenmanĝo en hoteleto, ni piediris la tutan valon *Kienthal* laŭ vojetoj, kiuj perdiĝis sur la dekstra montoflanko inter rokoj kovritaj de mirteloj kaj arboj. En la vilaĝo *Kienthal* ni longe piknikis en hotela ĝardeno, sentante la bezonon ĝui tiun lastan komunan manĝon, tiun amikecon naskiĝintan dum migradaj babiladoj, tiun ŝercemon pro samaj digestaj problemoj.

A.- Sed ĉio havas finon. Lasta marŝado nin kondukis al la vilaĝo *Reichenbach*, kie ni malkovris belegajn kaj malnovegajn ĉaledojn. Ni emis staradi por admiri iliajn skulptitajn trabojn kaj dekoraciojn. Kaj ni tiel trankvile alvenis en la stacidomon. Ni rigardis la horaron. Post kvin minutoj estos trajno. Ni kuregis al la ĝiketo. Kaj ni ĉiuj povis ricevi la deziritan bileton dank'al la pacienco de la trajnestro, kiu nin atendis preskaŭ kvin minutojn.

Cl.- Estas dum la mallonga veturado al *Spiez*, ke ni adiaŭis. La svisoj, kiuj facile povas atingi la alpan montaron, estis pli ĝojaj, ol la hungarino, kies okuloj malfacile akceptis forlasi la florojn kaj pejzaĝojn renkontitajn dum ŝvitiga migrado.

A.- Eble la venontan jaron, ankaŭ vi, kara aŭdanto, ĉeestos la trian migradon en la svisa montaro, kiun denove organizos Svisa Esperanto-Junularo. Ĝi verŝajne okazos en la kantono Grizono.

Cl.- Vi aŭdis prelegon el Svislando. Parolis gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond. Ĝis reaŭdo!